

MI ESTAS MILDA KAJ HUMILA

Komento al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Mateo 11, 25-30

En tiu tempo Jesuo preĝis, dirante: „Mi gloras Vin, ho Patro, Sinjoro de la ĉielo kaj de la tero, ke Vi tion kaŝis for de saĝuloj kaj prudentuloj, kaj malkaŝis al simpluloj. Jes, Patro, ĉar tiel plaĉis al vi. Mia Patro transdonis ĉion al Mi. Neniu konas la Filon escepte de la Patro. Kaj neniu konas la Patron escepte de la Filo kaj tiu, al kiu la Filo volas malkaŝi Lin.

Venu al Mi ĉiuj, kiuj estas lacigitaj kaj ŝarĝitaj, kaj Mi ripozigos vin. Metu sur vin mian jugon kaj lernu de Mi, ĉar Mi estas milda kaj korhumila, kaj vi trovos ripozon por viaj animoj. Ĉar mia jugo estas facila kaj mia ŝarĝo malpeza.”

Estas malfacila momento en la vivo de Jesuo: li komencis sian predikadon, kaj tuj atingas lin ultimato, kiu aspektas ekskomuniko, fare de Johano la Baptisto, kiu estas en la malliberejo, kaj sendas por diri al li: Ĉu vi estas la venonto, aŭ ĉu ni atendu alian? Evidente la predikado de Jesuo seniluziigas, Jesuo komencas prediki en la urboj, sed la rezulto estas tute malsukcesa. Fakte Jesuo plendas kontraŭ ĉi tiuj urboj - ili estas ĉefe tri: Ĥorazin, Betsaida kaj Kapernaumo – kaj Jesuo plendas, ke se li estus portinta la saman mesaĝon al paganaj urboj, ili estus konvertiĝintaj, tiuj ĉi ne. Kial ĉi tiu rezisto? Ĉar ili estas urboj regataj de la instruo de la sinagogo.

Kaj je ĉi tiu punkto, ni estas ĉe ĉapitro 11 de Mateo, versiklo 25, Jesuo ekkrias: *“En tiu tempo”,* do lige kun tio, *“Jesuo diris: «„Mi gloras Vin, ho Patro,”*, Jesuo ne parolas pri Dio, sed pri Patro, tio gravas por kompreni lian instruon, *“Sinjoro de la ĉielo kaj de la tero, ke Vi tion kaŝis for de saĝuloj kaj prudentuloj”,* Jesuo ne akuzas la klerulojn, sed dirante *“saĝuloj kaj prudentuloj”* li celas la leĝinstruistojn, la skribistojn, kiuj rezonas surbaze de la doktrino kaj de la leĝo, sed per la leĝo, la doktrino, oni povas diskuti, paroli pri Dio, dum pri la Patro oni povas nur sperti lian aman potencon imitante tiun amon, jen kial Jesuo parolas pri Patro. Laŭ la kleruloj, la saĝuloj, do la skribistoj, la leĝinstruistoj, Dio manifestiĝas en la doktrino kaj ne en la vivo, kiel kontraŭe instruas Jesuo.

Kaj, diras Jesuo, "*Vi tion kaŝis for de saĝuloj kaj prudentuloj, kaj malkaŝis al simpluloj.*". Malgraŭ la malsukceso de la predikado de Jesuo, estas grupo da homoj kiu sekvas lin: ili estas la marĝenigitoj, la senvaloruloj, la simpluloj, jen la personoj kiuj sekvas lin kaj aŭskultas lian mesaĝon.

Kaj daŭrigas Jesuo, denove ripetante la vorton Patro, "*Jes, Patro, ĉar tiel plaĉis al vi.*". Kaj ĉi tie Jesuo, per tipa teologia kaj rabena rezonado, asertas: "*Mia Patro transdonis ĉion al Mi. Neniu konas la Filon escepte de la Patro. Kaj neniu konas la Patron escepte de la Filo kaj tiu, al kiu la Filo volas malkaŝi Lin.*", kion intencas diri Jesuo per ĉi tiu rezonado? Dion, ni tion vidis, oni povas koni el la leĝo, la Patron nur en la amo. Do estante profunde homaj, estante sentemaj je la bezonoj kaj atentaj je la necesoj, je la suferoj de la aliaj, oni povas sperti la ĉeeston de la Patro. Kiel ni diris, Dio estas konebla tra la leĝo, la Patro nur tra la sperto de la amo. Kun Jesuo, Dio fariĝis homo, kaj la homo, la homeco, estas la nura sankta valoro.

Kaj poste estas la invito fare de Jesuo: "*Venu al Mi ĉiuj, kiuj estas lacigitaj kaj ŝarĝitaj,*", lacigitaj kaj ŝarĝitaj pro kio? Pro la observo de la leĝo, diros poste Jesuo en ĉi tiu sama evangelio, ĉar ĝuste ĉi tiuj saĝuloj, ĉi tiuj skribistoj, ĉi tiuj leĝinstruistoj, ligas pezajn ŝarĝojn sur la ŝultrojn de la homoj. La doktrinoj amasiĝas, kaj tial ili estas lacigitaj kaj ŝarĝitaj, kaj li diras: "*kaj Mi ripozigos vin.*", la termino utiligita de la evangeliisto signifas ripozigi, haltigi la penadon, reakirigi la spiron, ni povus diri: Mi estos via spiro.

Kaj poste, jen la defio de Jesuo: "*Metu sur vin mian jugon*", la jugo estis tiu ilo kiun oni metis sur la bovojn por ilin gvidi en la kampo, kaj ĝi estis bildo de la leĝo. La leĝo, la leĝo de Moseo, estis fariĝinta jugo, sed peza jugo. Tiam Jesuo invitas fari anstataŭigon: forlasu la jugon de la leĝo, la kredanto jam ne estas tiu kiu obeas al Dio observante liajn leĝojn, sed tiu kiu similas la Patron praktikante amon similan al la lia. "*Metu sur vin mian jugon kaj lernu de Mi, ĉar Mi estas milda kaj korhumila,*", Jesuo ne invitas imiti lian karakteron, tio ne eblas, sed lian socian elekton. Tiutempe, la "mildaj" estis la senhavuloj, la "humilaj" estis la lastaj, la marĝenigitoj, do metu vin flanke de la lastaj, tie estas mia ĉeesto. Kaj fakte li diras: "*vi trovos ripozon por viaj animoj.*", temas pri citaĵo el la libro de la Saĝo, kiu ripozigas la homojn.

Kaj finas Jesuo: "*Mia jugo*", do la akcepto de la imito de la amo de la Patro, jen la jugo, "*estas facila kaj mia ŝarĝo malpeza*», ne plu estas portendaj pezaj, kiuj dispremas la personojn, kiel poste denuncos Sankta Petro, kiam li diras en la kunveno: "Kial vi incitas Dion, dezirante meti sur la kolon de la disĉiploj jugon, kiun povis porti nek niaj patroj, nek ni?". Do la observo de la leĝo ne ebligis la komunecon kun la Patro, kontraŭe ja la akcepto, la amo, la praktiko de lia amo.